

# BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher  
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 1

Januaro / Februaro 1978



## La eterna Romo - nia kongresurbo en 1978



**Monumento de Viktor Emanuel II**

- Patriota altaro -

foto: Dehen, Köln



**En 1977 okazis la kongreso de IFEF en kampara loko de Britio. Kontraste al tio en 1978 la italaj gekolegoj gastigos la 30an kongreson de IFEF en sia metropolo Romo, de la 13a ĝis la 20a de Majo.**

Sendube tiu kongreso havos sian apartan signifon, unuflanke pro la jubilea karaktero, sed ankaŭ pro la elekto de la mondfama kongresloko.

Kiaj estas la eksteraj cirkonstancoj? Supozeble la plejmulto el la germanaj partoprenantoj vojaĝos fervoje, tra Svislando aŭ Aŭstrio. Kiu deziras uzi lit- aŭ kuŝvagonon, zorgu pri baldaŭa rezervigo, ĉar la veturo okazos antaŭ la pentkostaj festotagoj. Ankaŭ la rezervigo de sidlokoj estas rekomendinda.

Dum la alvenotago (13.5.) privataj aŭtobusoj transportos la kongresanojn de la stacidomo Roma Termini al la kongresejo Domus Pacis, kie oni loĝos kun plena pensio kaj kie okazos la plej multaj kongresaranĝoj. Kelkaj konas la domaron en parko belege situantan, ĉar ĝi gastigis postkongresanojn antaŭ kelkaj jaroj.

LKK transdonis — unufoje en la historio de IFEF — multajn taskojn al profesia agentejo, ekz. la mendon per ĉeko por ĉambroj, ekskursoj kaj postkongreso. Tiu metodo estas praktikata en multaj internaciaj kongresoj kaj malŝarĝas LKK por aliaj gravaj aferoj. Oni rekonu tiun formon de aliĝado, ankaŭ la denovan demandon pri la lingva kapableco. Tamen ripeto ne nepre necesas.

Permesu kelkajn paŝojn returnen en la historion. Laŭ la legendo Romolo, la posta unua reĝo, fondis Romon en la jaro 753 a. K. sur unu el la sep montetoj. La teritorio fariĝis respubliko kaj travivis pacan periodon, ĝis kiam en 390 a. K. barbaroj el la nordo invadis. Ili detruis la urbon tiel vaste, ke la nemurditaj enloĝantoj serioze intencis rekonstrui la urbon aliloke.

En tiu tempo estas konstruitaj la gigantaj muroj de Servius, kiuj parte ankoraŭ ekzistas. Sekvis la plej glora periodo de la romia historio. Militaj kaj politikaj konkeroj pligrandigis komercon kaj

riĉecon. La imperio etendiĝis de Mezafriko ĝis la nuna Skotlando. Romo havis du milionojn da enloĝantoj. La grandegan teritorion regis imperiestroj, kiuj pli kaj pli devis streĉe defendi la romiajn posedaĵojn. Eĉ Romo ricevis duan ĉirkaŭan muron, tiun de la imperiestro Aŭrelianus. La grandega imperio disfalis en du regnoj, la orienta kun la metropolo Bicanco kaj la okcidenta kun Romo.

La kristana epoko, komence persekuta kaj poste subtenita per la romiaj imperiestroj, finigis en la 4a jarcento la konstruadon de temploj, arkoj, termoj. Leviĝis kristanaj bazilikoj ornamitaj per mozaikoj. Multaj konstruaĵoj pli malpli bone konservitaj altiras nun la intereson de la vizitantoj. Romo estis dekomence la sidejo de la papoj. Dum la mezepoko Romo preskaŭ ruiniĝis pro invadoj kaj internaj bataloj inter la regantaj dinastioj. La papa sidejo transloĝiĝis al Avignon (Francio). Nur en la 14a jarcento ekfloris la t. n. Ora epoko. Komenciĝis i. a. la konstruo de la Petro-Katedralo. Mondfamaj artistoj verkis en la renesanca stilo. La 19a jarcento alportis la finon de la eklezie regata teritorio, la 20a la fondon de la vatikana ŝtato.

Kvankam la nuntempa Italio sekve de du militoj multon perdis de sia politika influo, Romo restis kulturriĉa celo de la tuta mondo. Tial eluzu ĉiujn ofertojn de LKK por ekkoni la metropolon, ankaŭ la modernan. Nepre vizitu la vaticanon kun ĝia fama muzeo. Vidu, kiel vivas la enloĝantoj. El la tri tuttagaj ekskursoj nur unu povas esti elektata.

Postkongresanoj konvinkiĝu, ke la bileto validas ĝis Napoli. Dum tri tagoj oni vizitos la urbon Napoli, la golfon de Amalfi kun la mirinde situanta Sorrent, la konatan insulon Kapri — ĉio en digna, sed multekosta kadro. Certe multaj eluzos la okazon por konatiĝi kun tiu belega parto de Italio.

W. B.

#### **Deziro**

S-ro Hugo A. Lingua, Casilla de Correo 278, 2000 Rosario/Argentina, volas korespondi kun Esperantistoj el Germanujo por ŝanĝi germanajn revuojn komence de argentinaj, ankaŭ en Esperanto.

**Das Wichtigste dieser Ausgabe in Deutsch Seite 2:** Das ewige Rom, unsere Kongreß stadt 1978

**Redaktfino por n-ro 2/1978 estas la 23. 3. 1978**



## El la grupoj / Aus den Gruppen

### Essen/Dortmund:

Nach dem vorliegenden Veranstaltungsplan für das 1. Halbjahr 1978 bietet der Esperanto-Kreis wiederum ein reichhaltiges Programm u. a. mit Dia- und Filmvorträgen unserer Mitglieder Anneliese Köhler und Heinz Schindler (Schwelm). Im Rahmen eines Weiterbildungsabends referiert Günter Bartz (Dortmund) über Eisenbahn Esperanto-Fachwörter. Das Zamenhoffest wurde von 35 Personen aus Dortmund und der näheren und weiteren Umgebung besucht. Mit Kaffee, Tee und Gebäck bewirtete Familie Bartz ihre Gäste.

### Frankfurt/Main

Infolge Schließung der Kantine Stuttgarter Straße finden unsere Treffen nun jeden 1. Dienstag im Monat um 16.30 Uhr im Zimmer 117 (Konferenzraum), Bundesbahn-Sozialamt, Karlstraße 4-6, in Frankfurt (unmittelbare Nähe Frankfurt Hbf) statt. Gäste sind freundlich willkommen.

Am 15. 11. 77 begann ein Sprachkurs. Unser Kontakt mit „Bona Espero“, Kinderdorf in Brasilien, gab uns auch dieses Jahr wieder Gelegenheit zu mitmenschlicher Hilfe über die Grenzen in Form von Paketsendungen. Mehrere Mitglieder unseres Bezirks sind an der Vorbereitung und Durchführung der IFES in Grainau, Februar 1978, aktiv beteiligt. Wir hoffen, zu einem ansprechenden Programm und zum Gelingen des internationalen Treffens unseren Teil beitragen zu können.

Bei der ROMOLO-Hauptzusammenkunft am 27. 11. 1977 mit c. 30 Teilnehmern wurde unser Mitglied Gernot Ritterspach zum Vorsitzenden und seine Ehefrau Elisabeth zur Sekretärin gewählt. Herzlichen Glückwunsch an unsere Aktiven.

### Köln/Schwelm:

Raporto pri la Zamenhof-festo en Schwelm la 3an de Decembro 1977

En Schwelm okazis la tre bone organizita Zamenhof-festo. Partoprenis 70 Esperantistoj el la distriktoj Köln, Essen kaj Hannover, inter ili la GEFA-sekretario, la redaktoro, kaj geamikoj el Belgio.

Post komuna kanto salutis la grupestro de Schwelm, sinjoro Kronshage, kaj kolego Herlitze kiel fervoja distrikt-komisiito de Kolonjo la gastojn kaj partoprenintojn.

La belga amiko Torben Kehlet montris

lumbildojn pri la famkonata „Bona Espero“ en Brasilio. La diapozitivaj vekis ne nur grandan intereson, sed ankaŭ instigis la partoprenantojn aĉeti multajn lotojn de la abunda kaj valorriĉa loterio. La enspezoj de Gm 500,— estas disponataj por la kreskado kaj prospero de „Bona Espero“ kaj ties infanoj. La resto de enspezoj estas disponata por la kreskado de la Esperantomovado en Malagasio.

La feston ankaŭ vizitis la urbestro Raimer Döring. Sinjoro Kronshage dankis la urbestron pro la subteno de la Esperantogrupa Schwelm kaj memoris lin nomigi straton kiel „Esperanto-Vojo“. La urbestro promesis tion, menciis la tre gravan celon kaj idealon de nia komuna lingvo por pli bona kompreniĝo inter ĉiuj homoj de la mondo. Kun la forigo de miskompreniĝoj kaj lingvaj barieroj ni certe ricevos la esperon por paco kaj pli bona vivo en ĉiuj landoj.

Kolego Schindler montris tre interesan filmon pri la lasta UEA-kongreso en Islando. Ĉiuj, kiuj ne partoprenis la UEA-kongreson certe bedaŭris tion. Post komuna vespermanĝo oni disdonis per gaja humoro la premiojn de la lotumado.

La festo finiĝis kun danco, babilado kaj preparita kvizo. Estis ne nur sukcesa festo kaj ĉiuj jam nun ĝojas pri denova renkontiĝo en Schwelm.

Dankon al la grupestro Kronshage, al gekolegoj Schindler kaj Lohse al ĉiuj, kiuj helpis kaj donacis valorajn aĵojn por la lotumado.

Nia membro, sinjorino Köhler, raportis pri nia kunveno al la Schwelmer-taggazeto, en kiu oni publikis du artikolojn kun bildo.

Herlitze

### München

Sendube la Munkena Zamenhof-festo estis — laŭnombre — unu el la plej grandaj.

Ĉ. 70 personoj, inter ili multaj gejunuloj, ĉeestis la feston, ili aŭdis la enkondukojn vortojn de Josef Weidacher, rigardis la filmon de W. Barnickel pri Frankfurt kaj Norvegio kaj aŭdis la diversajn elpaŝojn kaj surprizojn de Reinhold Maier.

Granda loterio donis certe profiton kaj bonajn gajnojn al partoprenantoj. Virinaj esperantistoj de Munkeno zorgis pri manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.



**Estraro kaj komisiitoj de la unuiĝo Germana Esperanto Fervojista Asocio  
en la Sociala Organizo de Germana Federacia Fervojo  
Stato: Januaro 1978**

**Estraro**

**Prezidanto:** BAR Gießner, Bf 3420 Herzberg (Harz); Basa 949/887/391

**Vicprezidanto/Redaktoro:**

BAR Graß, BD 5000 Köln - F-Büro, F 12 - Basa 943/1641 privata adreso: 5650 Solingen 11, Meteorstraße 13

**Sekretaro:** BAmtm Schrapp, SV Nord, - Gruppe BVA - 4400 Münster (Westf.); Basa 945/1771

**Apartaj komisiitoj**

**Administradon de la BSW-financrimedoj:** Elfriede Kruse, 6000 Frankfurt/Main 70, Wiener Straße 121

**Arkivo:** BOS Barmaneter, Bf 8940 Woringen (Schwabens) - über Memmingen - Bez. München; Basa 964/824/365

**Biblioteko kaj gazetkolektado:**

BAmtm Rösemann, BD 3000 Hannover, Bf 70, Basa 949/2378 aŭ 1350

**Bulteno-dissendo:** BOS Schindler, Bf 5830 Schwelm (Köln); Basa 943/828/126

**Fakterminaroj:** HLOkf Hartig, Bw 2800 Bremen Hbf; Basa 949/833/365

BAR Ritterspach, ZVL 6500 Mainz, AA5005, Basa 954/5533

**Junularaferoj:** BS Uwe Sorge, Bf 2449 Nürtingen; Basa 947/868/382

**Lingva ekzamenoj kaj instruado:**

BAR Lautenbach, Bf 6400 Fulda; Basa 957/822/122

**Kasisto:** BOS Bernhard, Bf 6703 Limburgerhof; Basa 953/856/42 aŭ 43

**Varbado / Informado:** TBAR Brandenburg, Hbm 4400 Münster (Westf.); Basa 945/397

**Ekspozici-ekipoj:** Grf Wentker aŭ (kaj) Grf Mertens, ambaŭ en Hochbaubahn-

meisterei (Hbm) 4400 Münster/Vestfaliao; Basa 945/1498. Eksped-adreso: Hbm Münster i.W., Lager Ga.

**Essen:** TBOS Retzlaff, BD Essen, T-Büro, T 113; Basa 944/1293

**Frankfurt/Main:** BAmtm Kiefer, BSA 6000 Frankfurt/Main, AA 1020, Basa 955/6070

**Hamburg:** BAR i.R.Lepke, 2000 Hamburg 52, Tellkampfweg 6b. Deĵorajn postaĵojn al: BSW Hamburg - SW 64 -

**Hannover:** BHS Heimlich, Bm 3040 Soltau; Basa 949/850/127

**Karlsruhe:** BAR Hug, BD 7500 Karlsruhe - Ps-Büro Ps 26; Basa 953/5005

**Köln:** BOI Herlitze, BD 5000 Köln, Büro B (Ozl); Basa 943/472

**München:** Vorhdw Weidacher, Bw 8000 München-Ost; Basa 962/812/814/553 aŭ 566

**Nürnberg:** BHS Müller, Bahnpolizeiwache Hof, Bp-Posten 8620 Lichtenfels; Basa 966/842/388

**Saarbrücken:** BHS Müller, Bm 6620 Völklingen; ;Basa 956/8113/134

**Stuttgart:** TBAR Krüger; BD 7000 Stuttgart, Bmkr. 3; Basa 952/5725

**Peto al la eksterlandaj geamikoj!**

Ĉi tie ni komunikas la aktualan adresaron de la GEFA-estranaroj kaj de la distriktaj komisiitoj. Bonvolu korekti vian liston kaj eventuale ŝanĝi la preparitajn adresojn por garantii la akuratan akcepton. Se vi mem havas dezirojn rilate la akcepton de nia BULTENO, ni urĝe petas informi nian sekretaron.

GEFA elkore gratulas

**Reinhold Schmidt**


8500 Nürnberg, Johannisstraße 33/172  
Ĉiu aktiva fervojista esperantisto konas lin.  
La 2an de Decembro 1977 li estis

**80 jara.**

Post grava malsano li nun refoje kolektis tiel rapide novajn fortojn, ke li denove povas viziti E.-kongresojn kaj -kunvenojn. Reinhold Schmidt estas la plej maljuna esperantisto de la E.-grupo Nürnberg. Ek de 1921 li okupiĝis pri Esperanto. Ĉiun jaron li partoprenis kun sia edzino plurajn E.-kongresojn en- kaj eksterlande.

Malgraŭ sia aĝo li ankoraŭ ĉiam estas tre vigla kaj havas kontakton kun siaj leteramikoj en la tuta mondo.

Multan sanon kaj ĉion bonan!



**Reinhold Schmidt**

Ankaŭ estontece ankoraŭ multajn feliĉajn jarojn! H M